

& Lokomotivo kaj sandalo:

< Rekante 9 el 17 batoj por strofo, entute 102 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:17> (/doododo mimi; soosofa mimi; faafami rere; soosofa mimi;

(#Rekantaĵe: doododo mimi; soosofa mimi; faafare Tire; mire do o)
)×6)+

(&Strofoj:

'1 Lokomotivo ; kaj la sandalo ; havis
proceson: ; granda skandalo!

(×.; **Tretu, ripetu ; kion mi kantas ;
tuj en la sekva bela strof'**.)

'2 La monda globo ; kies propraĵo ; (laŭ
la merito, ; ne - laŭ la aĝo)?

'3 La juĝa korto ; juste decidu ; nun, kiu
pravas. ; Kaj vi ne ridu!

'4 Grave cerbumas ; la advokatoj ; pri la
demando ; jam dum monatoj:

'5 Lokomotivo ; kun fera zono ;
mondon katenas ; ĝis Vaŝingtono.

'6 Sed sub sandaloj ; ĝis la polusoj ; la
mondon havas - ; angloj kaj rusoj!